

KAMPANJAJ NOVAĴOJ

Unuiĝintaj verdulaj partioj eŭropaj

KAMPANJAJ NOVAĴOJ DE LA EŬROPAJ VERDULOJ - Tria eldono –

Novaĵoj de la 20a ĝis 27a de majo 2009

Ni denove dankas ĉiujn naciajn partiojn, kiuj sendis siajn novaĵojn, flickr-fotojn kaj balotajn aŭgurojn. Por nia 4a kampanja informilo venontsemajne bonvolu sendi viajn informojn al Graham.Burgess@europeangreens.net kaj jane.kelsey@skynet.be ĝis mardo la 2a de junio kaj ni certigas, ke viaj eventoj dissendatos al la EUaj naciaj partioj.

KAMPANJAJ NOVAĴOJ DE MEMBRAJ PARTIOJ

ANGLIO KAJ KIMRIO

Demonstracio ĉe la Heathrow-a flughaveno kontraŭ plivastigo de la flughaveno. Vidu John Hunt ĉe <http://www.youtube.com/watch?v=hPTjbJmhj1U>

Je la 27a de majo la Verdula Partio lanĉis ok promesojn pri egaleco por LGBT-uloj. Joseph Healy kaj John Hunt el Londono, Lesley Hedges el Yorkshire kaj Humber kaj Chris Williams el Okcidentaj Midlandoj kandidatiĝas kiel malkaŝaj gejo kaj lesbanino de Verdula Partio en la eŭropa voĉdonado. Por scii pli, iru al <http://www.greenparty.org.uk/news/2009-05-27-green-candidates-out-and-proud-euro-elections.html>

Caroline Lucas, EP-ano, gvidanto de Verda Partio de Anglio kaj Kimrio, estas prezenta kiel plej bona brita EP-ano pro malkaŝemo, respondigeblo, demokratio kaj malŝparemo de kampanjogrupo Open Europe. Kaj la EP-anoj de Verda Partio estas rangitaj pli alte ol la grupoj de ĉiuj aliaj britaj partioj. Plu vidu ĉe <http://www.greenparty.org.uk/news/2009-05-25-open-europe.html>

BELGIO

Groen! nun troviĝas je 9% en opinisondadoj.

Rigardu la novan balotkampanjaĵon por Bart Staes ĉe www.bartstaes.eu En esploro farita de la flandria ĵurnalo De Standaard, nomita Obarometer, kandidatoj kaj politikistoj de Groen! estas trovitaj la plej aktivaj en sociaj forumoj, kiaj Facebook kaj Twitter. Ecolo havas diversajn kampanjajn videojn, interalie tre amuzan videon argumentantan, ke malvalida voĉdono signifas voĉdono por iu alia. Rigardu la videon ĉe http://www.dailymotion.com/video/x9cwg9_voter-blanc-cest-donner-sa-voix-a-q_news

ECOLO ĉiam estas ĉe la avangardo en alvoko al plenaj rajtoj por ĉiuj malplimultaj grupoj kaj estis la unua belga franclingva politika partio inkluzivanta en sia manifesto la edziĝan kaj adoptan rajtojn por samseksemaj paroj, nun akceptitajn kiel leĝo.

FRANCIO

Ĉi-semajne Daniel Cohn-Bendit, Eva Joly, Cécile Duflot kaj Jean-Marc Brulé parolis en kerna renkontiĝo en Cesson, Francio. La renkontiĝo en Cesson allogis pli ol 900 homojn, dum evento en Bordeaux Talence nombris 1000 partoprenantojn. La lastaj opinisondadoj montras Europe Ecologie ĉe 10.5%, kio estas kresko kompare kun antaŭaj balotadoj. Ĉiuj fotoj estas ĉe <http://photos.europe-ecologie.org/zen/>

Ĉuj partiaj sukcesaj videoj troveblas ĉe <http://www.europeecologie.fr/contenu/europe-ecolozik-zap-bulles-buzz>

SVEDIO

En Svedio, la pintaj tri kandidatoj travojaĝis ĉiujn partojn de la lando kaj ankoraŭ ricevas favoran respondon el la amaskomunikiloj - pro pozitiva balotado kaj multaj pozitivaj rezultoj por Carl kaj aliaj kandidatoj en diversaj sondadoj - ekzemple Open Europe rangis Carl kiel pintan EP-anon en sia enketo. La Svedia verdula partio ankaŭ starigis aktivan retejan gerilon koncentriĝante pri sociaj medioj - Facebook, Twitter, blogoj, ktp. Tiuj agadoj sekveblas en ilia blogo ĉe <http://webbgerilla.mp.se/>

SLOVENIO

Ĉi-semajne SMS (slovenia junularo partio) - Zeleni Evrope aktivis demonstraciante kontraŭ genteknike modifita manĝaĵo antaŭ la Nacia Asembleo en Ljubljano. La saman tagon sloveniaj deputitoj adoptis la konvencion pri kunekzistado de genteknike modifitaj (GM) kultivaĵoj kun aliaj agrokultivaĵoj. Ni konvinkite kredas, ke la GMo endanĝerigos ekologian agrokultivadon kaj fabrikado de ekologiaj produktoj en Slovenio, kiuj devus esti nia prioritato. La sekvontan tagon SMS (Slovena junularo partio) - Zeleni Evrope - renkontiĝis kun OSCE-aj reprezentantoj, kiuj respondecas pri monitorado de la balotoj por la europa parlamento (EP). Ili raportis la diskriminacian sintenon de la amaskomunikiloj, precipe de la nacia televidaj kaj radiaj stacioj (RTV SLO), la ĉefa komerca televido (POPMUZIKA TELEVIDO) kaj ankaŭ de slovenia gazetara agentejo (STA).

SLOVAKIO

La slovakia kampanjo ekas per impona aro da eventoj dum la tuta semajno en multaj urboj en la lando. En ĉiuj tiuj urboj estis ŝanco vidalvide renkontiĝi kun la pinta kandidato Jana Budacova kaj unu el la kandidatoj, kiuj disdonis iujn kampanjajn materialojn kaj prezentis kaj diskutis diversajn aferojn kun civitanoj. Je la 30a de majo Ulrike Lunacek aliĝos al Jana por kampanji okaze de LGBT eventoj.

GERMANIO

La Germanaj Verduloj okazigas "Rok-Europa"n eventon en Berlino je dimanĉo la 31a de majo kun sursceneja bando, kradrostado, poezia evento kaj kandidatoj kiel diskĵokeoj! Je la 4a de junio, ili okazigas sian ĉefan kampanjan eventon kun gvidantaj kandidatoj Rebecca Harms kaj Reinhard Bütikofer kaj partia prezidanto Claudia Roth. Dum la lastaj 72 horoj de la kampanjo, la kandidatoj kaj ties teamoj kampanjos tuttagnokte. Ili respondos al demandoj de balotontoj rekte telefone, enrete kaj persone. Pli pri ĉio ĉi estas ĉe <http://www.gruene.de>

GREKIO

La grekaj verdulaj EP-kandidatoj organizadas eventojn kaj gazetarajn konferencojn en la tuta lando. Ili ankaŭ starigas en plej multaj Grekaj urboj voĉdonadajn pavilonojn, kiuj allogas multan atenton kaj demandojn de civitanoj pri la programo de la verduloj. La nombro da subtenantoj sur la verdula Facebook-a retejo ankaŭ kreskas rapide. Opinisondoj lokigas Oikologoi-Prasinoi-n inter 8 kaj 8.5%, kio signifas, ke ilia subteniĝo ankoraŭ pliiĝas.

FINNLANDO

Elstaraj atrakcioj de la pasinta semajno inkluzivas televidan debaton je la 14a de majo kun ĉiuj partiaj kandidatoj de la urbo Turku. Ĉiu partio estis preparinta 2 minutan prezentaĵon por la elsendo. Je la 16a ĝis 17a de majo en la urbo Jyväskylä, verdulaj kandidatoj kampanjis por la fervojo de Tallinn al Berlino tra Varsovio. <http://www.youtube.com/watch?v=KFFVd9i5VDg->

Je la 16a de majo la Verduloj organizis popolkunvenon, kie la manifesto estis enkondukita kaj klarigita de verdulaj kandidatoj.

NOVAĴOJ DE EŬROPAJ VERDULOJ

La Eŭropa Verdula Partio instigas siajn membrajn partiojn rememorigi siajn membrojn kaj subtenantojn loĝantajn en aliaj EUaj landoj voĉdoni favore al verdulaj kandidatoj en la eŭropa balotado en la lando, kie ili nun loĝas, supozante, ke ili jam registriĝis por voĉdoni tie. (Estas tro malfrue por registriĝi nun!) En streĉa konkurso, ĉiu ekstra voĉdono povus esti krita kaj estas nemalhaveble, ke Verduloj vivantaj ekster sia hejmlando subtenas la lokan partion en sia loĝlando! Tiom da EUaj civitanoj vivas eksterlande, ke nun tute egalas kie ajn vi estas, via partio verŝajne havas membrojn en tiu situacio, tial bonvolu kontakti ilin pri ĉi tio. Nur du ekzemploj: estas multaj poloj loĝantaj en Londono, kie ili povas helpi reelekti Jean Lambert, dum homoj vivantaj kaj laborantaj en Bruselo povas voĉdoni favore al Ecolo aŭ Groen! Memoru, ke voĉdonado okazas inter la 4a kaj 7a de Junio, laŭ la lando. Do homoj kontrolu la aranĝojn en la lando, kie ili registriĝis por voĉdoni.

YOUTUBE

Spektu ĉe Youtube videojn <http://www.youtube.com/europeangreens> - Ne maltrafu 'Don't bark: vote!' ("Ne bleku: voĉdonu!")

Dissendu la ligilon al viaj amikoj!

GREENSTIME

<http://apps.facebook.com/greentime/>

Instalante tiun aplikaĵon, vi ebligas nun ĝisdatigi vian Statuson ĉe Facebook ĝis la Eŭropaj Balotadoj. Instalante la aplikaĵon bonvolu asigni specialajn permesojn por nekonekta aliro kaj ĝisdatigo de via statuso. Bonvolu nepre asigni tiujn permesojn, alie la aplikaĵo ne sukcesos!

PROFILO

Ŝanĝu vian profilon ĉe Facebook al nia!

<http://europeangreens.eu/think big>

MALTO

En gazetara konferenco, kiun ĉeestis Juan Behrend, Ĝenerala Sekretario de Eŭropaj Verduloj, Alternativa Demokratika anoncis, ke Eŭropaj Verduloj submetis interpelacion en Eŭropa Parlamento pri trafikadministrado kaj urba aerkvalito en Sliema kaj Gzira. La interpelacio submetita de la prezidanto de la Eŭropverdula Parlamentogrupa Monica Frassoni estas alligita al tiu gazetara komunikaĵo. Por vidi pli:

<http://www.alternattiva.org.mt/page.asp?n=newsdetails&i=13153>

IRLANDO

La Irlandaj Verduloj lanĉis sian partipolitikan elsendon por la eŭropaj balotadoj. La video koncentriĝas pri verdulaj laborpostenoj kaj nia respondeco al estontaj generacioj kiel nur du kialoj por voĉdoni verdule. Jen kie troveblas la video:

<http://www.election09.ie/just-two-reasons-vote-green-video>

HUNGARIO

La alianco de LMP (Politiko povas esti alia) kaj Humanista Partio prezentis sian programon por la eŭroparlamentaj balotadoj en 49 diversaj lokoj en la tuta lando dum la lastaj tri semajnoj. Ĉi-semajne dum surstrata demonstracio ili preparolos aferojn pri kampara evoluigo, la ŝancoj, kiujn Eŭropa Verda Nova Konvencio kreus por Hungario kaj la konservo de sociaj atingitaĵoj ene de la landoj de Eŭropa Unio. La opinisondado lokigas la LMP-HP-liston ĉe 2 %: nacia voĉdonado farita je la komenco de la EP-a kampanjo de la Hungara Gallup-instituto vidas la subtenon por la LMP-HP-listo flank-ĉe-flanke kun la du malgrandaj partioj de la Hungara Parlamento, Liberal-Demokratoj (SZDSZ) kaj Demokrata Forumo (MDF). La enketo ankaŭ rivelis, ke LMP povas fidi al treege aktiva subtenanta bazo - kun 80% de potencialaj balotantoj „tre probable” por

efektive subteni la partion je la voĉdona tago. Kun la nombro de voĉdonontoj aŭgurata je 36%. la LMP-kampanjantoj esperas esti surprizon je la 7a de junio.

Wiertzstraat 31, B1050 Brussels, Belgium | T: +32 2 622 07 20 | F: +32 2 626 07 29 |
europeangreens@europeangreens.org

www.europeangreen.eu | www.europeangreens.ning.com | [www.twitter.com/greencampaign09](https://twitter.com/greencampaign09)

www.europeangreens.eu/facebook | www.youtube.com/europeangreens